

RAPORTO PRI LA VIZITOJ DE KLUBOJ DE ESPERANTO KAJ/AŬ GEESPERANTISTOJ en BURUNDO

Raportas Gilbert Ndhokubwayo

Noto : ANEB = Asocio Nacia por Esperanto en Burundo, landa asocio de UEA

Ekde la 5a de Septembro 2020 ĝis la 19a de Septembro 2020, mi faris rondvojaĝon, kaj vizitis klubojn de Esperanto, nunfunkciajn kaj intajn. Mi ankaŭ vizitis lokojn, kie ne estas kluboj por kunparoli kun la loĝantaj esperantistoj pri la ebleco starigi klubojn por instruado de Esperanto.

La celo de la vizitoj estis :

- Fari kontaktojn kun geesperantistoj post mia fariĝo de la nuna respondeculo de la instrusekcio en la movado de Esperanto en Burundo;
- Revivigi dormantajn klubojn;
- Starigi novajn klubojn;
- Kuraĝigi kaj fortigi la instruadon de Esperanto en Burundo.

Vizito al Buterere : Diskuto kun Lucien Kagina :

Mi vizitis Lucien Kagina por demandi al li ĉu li povas pretiĝi por la starigado de klubo de instruado de Esperanto en Buterere.

Por Lucien Kagina, li ne havas tempon por instrui Esperanton, li okupiĝas pri sia labro kaj siaj familiaj zorgoj. Pro tio li ne havas tempon liberiĝi por instrui Esperanton.

Vizito al Rugombo : Diskuto kun Eric Nsabiyumva :

Eric Nsabiyumva estas malnova esperantisto, sed ne plu aperas en la movado de Esperanto. Mi vizitis lin al Rugombo, kie li loĝas.

Li iam havis klubon de Esperanto en Rugombo, sed la klubo ne funkcias longtempon. Mi do vizitis lin por demandi al li la restarigon de la klubo en Rugombo.

Eric Nsabiyumva akceptis reinstrui Esperanton en sia loĝloko, li diris al mi ke li estas preta instrui Esperanton al infanoj de infanĝardeno. Li starigis projekton de infanĝardena lernejo, kie estas ricevitaj kaj instruitaj infanoj aĝaj inter tri al ses (3-6) jaroj.

Eric Nsabiyumva do promesis al mi instrui programon de Esperanto al la infanoj en la infanĝardeno. Pro tio, li bezonas kaj petis instruprogramon por infanoj (movaj desegnaĵoj, kantoj por infanoj, ktp).

Dum mia vizito al li en Rugombo, li rakontis al mi ke li plu havas la emocion de la lingvo Esperanto, li eĉ baptis sian lernejon per esperanta nomo "Verda Stelo".

Vizito al Buyenzi : Diskuto kun Isaac Manirambona :

Isaac Manirambona estas studento en la Nacia Instituto de la publika sano. Li lernis Esperanton, kaj ricevis atestilon antaŭ tri monatoj.

Mi vizitis lin al Buyenzi por kunparoli kun li pri la ebleco starigi klubon en Buyenzi.

Ni konsentis kun Isaac krei klubon de Esperanto en la Elementa Lernejo FOREAMI. Li petis, kaj mi promesis al li helpi en la proceduroj de peto de permeso por la okazigo de la klubo al la Elementa Lernejo FOREAMI. Post la starigo de la klubo Isaac Manirambona promesis al mi okupiĝi pri la instruado en la klubo, kaj petis al mi fari vizitojn al la klubo por la kuraĝigo de klubanoj. Mi tion promesis.

Isaac ankaŭ petis ke post la starigo de la klubo, ni havigu al li materialojn, kiel lernolibrojn kaj vortaron.

Nun, dum mi redaktas la jenan raporton, mi jam havis la informon de Isaac ke la respondeculo de FOREAMI ne volis doni lernolokon en la lernejo FOREAMI, sed promesis doni lernoĉambon en la paroko Saint Augustin de Buyenzi. Nu plu atendas la havigon de la promesita lernoĉambro.

Vizito al Rumonge : Diskuto kun Benjamin Ndikumwenayo :

Iam ekzistis klubo de instruado de Esperanto en Rumonge. Sed, nun la klubo ne plu ekzistas, nur malnovaj esperantistoj plu estas, kaj ne naskiĝis novaj esperantistoj.

Mi demandis al Benjamin kial ne plu ekzistas klubo de Esperanto en Rumonge. Esperantistoj de Rumonge, kiuj devis okupiĝi pri la klubo havas aliajn zorgojn, inter aliajn, familiajn kaj vivlaborajn okupaĵojn. Pro tio ili ne plu havis tempon por okupiĝi pri la instruado de Esperanto en tiu loko.

Al mia demando al Benjamin, ĉu li ne povas okupiĝi pri la instruado de Esperanto en Rumonge, li respondis ke li iam instruis Esperanton. Sed, li ne trovis subtenon por havigi al li bezonataĵojn, kiel kretojn, por fari fotokopion de broŝuroj, kelkefoje, moviĝi de la hejmo al la klubo postulis al li monon, kiun li ne plu havis. Kiam li lernis Esperanton, li estis informita ke Esperanto ne donas monon, sed ke per Esperanto oni povas havi monon. Tion li ne rimarkis, neniu montris al li kiel havi la diritan monon per Esperanto.

Li tiam haltis la instruadon de Esperanto pro manko de financa ebleco.

Mi plue demandis al Benjamin kion li postulus se ni petus al li restarigi la neplu funkciantan klubon de Rumonge.

Li respondis ke nuntempe, li ne havas laborokupaĵon. Li do povas okupiĝi pri la klubo, sed demandas ke estu eĉ iom da honorario, kiun li ne volis precizi dirante : « vi estas maturaj, vi mem povas imagi kiom doni al laboranta homo ».

Pro tio, li petas ke estus disponigita al li programo de instruado laŭ diversaj niveloj de instruado de Esperanto.

Li ankaŭ povos instrui Esperanton al la infanoj de la Infanĝardeno de la centro de ANEB en Rumonge, kaj postulas Programon de instruado por infanoj, kun desegnaĵoj, ktp.

Fine, ni konsentis ke li jam povas komenci varbi membrojn, kiuj povas aniĝi en la klubo por lerni Esperanton.

Li bezonos afiŝojn por la disigo de la informo pri la klubo de Esperanto, en diversaj lokoj de Rumonge.

Vizito al Gasanda : Diskuto kun Dieudonné Harumukiza :

Ankaŭ en Gasanda iam ekzistis klubo de instruado de Esperanto. La klubo precipe enhavis, inter aliajn, lernantojn de la elementa lernejo de Gasanda. Sed la klubo nun ne plu ekzistas.

Dum mia konversacio kun Dieudonné, mi demandis al li, kial la klubo de Esperanto en Gasanda ne plu funkcias.

En siaj respondoj, Dieudonné unue konfirmis ke verdire en Gasanda ekzistis klubo de instruado de Esperanto, ke la klubo estis forta ĉar enhavis multajn geesperantistojn.

Li daŭris rakonti al mi ke dum la funkciado de la klubo de Gasanda, ili ricevis pliajn vizitojn de geesperantistoj venintajn de eksterlande, kiuj eĉ faris promesojn al la klubo. Kelkaj el la promesoj, estis la financa helpo por starigo de kantino al la lernejo, komputiloj, libroj.

Ili do malŝatis ke multaj promesoj ne atingis al ili, indikante al mi ke nur kelkaj promesoj, kiel unu komputilo, kelkaj libroj atingis la iaman klubon de Gasanda.

Dieudonné daŭris dirante al mi ke iam, ili ricevis informojn ke estus pakaĝoj de donacoj al la klubo de Gasanda, kiuj ne atingis ilin.

Dieudonné akceptis restarigi la klubon de Esperanto en Gasanda, sed petis la subtenon de altinstancoj en la movado de Esperanto. Li akceptis kontakti la estrojn de la Liceo de Gasanda por peti la permeson restarigi la klubon.

Vizito al Kiremba : Diskuto kun Achel Iranyumvira :

Achel Iranyumvira estas studanto al la Universitato de Kiremba. Mi vizitis lin por diskuti kun li pri la ebleco starigi klubon al la Universitato de Kiremba.

Laŭ miaj konversacioj kun li, Achel estas preta kaj interesa helpi en la klubo al la Universitato de Kiremba.

Li estas devena de la iama klubo de Gasanda. Li rakontis al mi ke li aprezis mian viziton al li en la kadro de Esperanto ĉar, diras Achel « Mi iom post iom forgesetis Esperanton, oni diris ke Esperanto estas lingvo de amikeco, sed mi iel konstatis ke en la movado de Esperanto ne estas solidareco. Pro la iama amo de Esperanto, mi vere ĝis nun interesiĝas al la lingvo. Via vizito estas kuraĝigo al mi ». Li plue informis al mi ke en sia loĝloko Kiremba, li esperas havi multajn interesatojn lerni Esperanton.

Pro tio, Achel petis subtenon, kiel vizitojn de respondeculoj en la movado, materialojn por instrui la lingvon. Li **petis kaj emfazis havi sanktan biblion en Esperanto**. Li iam aŭdis ke ekzistas biblioj eldonitaj en Esperanto. Li diris al mi ke la havigo al li de la sankta biblio en Esperanto povos helpi al li varbi multon en sia eklezia skipo de la Universitato de Kiremba.

Vizito al Nyanza Lac : Diskuto kun Rashidi Mateso kaj Alexis Nkurunziza :

En Nyanza Lac, mi renkontis du esperantistojn, kun kiuj mi interparolis. En tiu loko iam ekzistis klubo de instruado de Esperanto. Miaj demandoj al Rashidi kaj Alexis estis, kial la klubo ne plu funkcias, kiujn problemojn ili renkontis, ĉu nun ili povas reorganizi kaj refunkciigi la klubon.

Rashidi kaj Alexis, diris al mi ke nun la klubo de Nyanza Lac ne funkcias, ĉar ĝi renkontis problemojn, kiel la mankon de tempo al instruistoj, kiuj devis okupiĝi pri la instruado en la klubo, la instruistoj, kiuj antaŭe instruis en la klubo de Nyanza Lac forlasis la instruadon pro aliaj laborokupaĵoj de la vivo.

Rashidi kaj Alexis, ankaŭ estas laboristoj. Ili informis al mi ke ili ankaŭ povis daŭrigi la instruadon de Esperanto en la klubo de Nyanza Lac, sed tio por ili postulas rimedojn. Por ekzemplo, diras Alexis, li povis eĉ krei klubon kaj instrui Esperanton al lernantoj de iu elementa lernejo. Sed la instruado en la klubo postulus al li rimedojn, interaliajn, la transportadon ĉar la lernejo estas iom for.

Ili diris ankaŭ ke la klubo de Nyanza Lac malfortiĝis iom post iom pro la manko de vizitoj de estroj de la movado por la konstato de ĝiaj laboroj kaj la subteno morale kaj finance.

Rashidi kaj Alexis plue informis al mi ke la klubo de Nyanza Lac ne ricevis subtenon por ĝia funkciado. Nun, rakontis al mi, por ke la klubo refunkciu, ili bezonas instrulokon kaj materialojn. Ili ankaŭ petas ke instruistoj de Esperanto estu subtenitaj finance por havigi al ili la motivon.

Ili indikis al mi ke estis kreita futbalteamo nomita « Laga Amiko FC Nyanza Lac », la teamo plu ekzistas kun la sama nomo. Ili do esperas ke surbaze de tio povos esti bona oportuno restarigi la klubon de Esperanto en Nyanza Lac.

Rashidi kaj Alexis ankaŭ parolis al mi pri la ne havigo de diplomoj al geesperantistoj, kiu ekzameniĝis en la meza nivelo dum la kongreso de Esperanto en Nyanza Lac en Aprilo 2018. Ili diris ke ili estas inter la grupo de geesperantistoj, kiuj faris la ekzamenon de meza nivelo, ili atendadis siajn diplomojn, sed ĝis nun ne ankoraŭ ricevis ilin.

Vizito al Mabanda : Diskuto kun Alphonse Masabo :

Alphonse Masabo iam havis klubon de instruado de Esperanto en Mabanda. Mi do demandis al li kial la klubo ne plu ekzistas.

Alphonse Masabo informis al mi ke la klubo ne longe daŭris, ĝi nur funkciis almenaŭ kvar monatojn, post Alphonse ne plu havis tempon por daŭre okupiĝi pri la instruado de Esperanto en la klubo. Li estis dungita de laboro, kaj okupiĝis pri ĝi.

Mi demandis al Alphonse ĉu nuntempe ne eblas restarigi la klubon, ĉar laŭ informo de li, la laboro kiu okupis lin nun finis.

Alphonse Masabo akceptis ke eblas restarigi la klubon, ĉar nun li povos liberiĝi almenaŭ unu aŭ du fojojn semajne por instrui Esperanton. Li informis al mi ke li estas en bonaj rilatoj kun estroj de la ĉirkaŭa katolika preĝejo, ke li do povos kontakti ilin por peti lernoĉambron por la okazigo de la klubo. Alphonse petis flagon de Esperanto en kazo ke tio eblos. Li ankaŭ diris ke li bezonos subtenon, kaj petis materialojn, inter aliajn, vortaron kaj librojn.

Mi kuraĝigis lin iri antaŭen. Mi ankaŭ petis al li pensi pri la trejnado de aliaj esperantistoj en la klubo, kiuj povos okupiĝi pri la klubo en kazo ke li povos manki tempon pro iu ajn kialo.

Mi konstatis ke la nivelo de Masabo en Esperanto ankaŭ ne estas tiom sufiĉa, li do bezonas iom da maturiga trejnado.

Vizito al Makamba : Diskuto kun Eloi Twubake :

Eloi Twubake loĝas en Makamba. Mi vizitis lin por demandi al li ĉu eblas restarigi klubon de instruado de Esperanto en Makamba, ĉar en tiu loko iam ekzistis klubo de Esperanto, kiun starigis Cédrick Irakoze.

Eloi Twubake promesis al mi ke li povos kontakti la estron de la elementa lernejo (Lycée Communal Saint Pierre Claver), kie estis la klubo de Esperanto, kaj povos peti permeson por restarigi la Klubon. Eloi mem lernis al tiu lernejo, li diris al mi ke li esperas ke li ricevos favoran respondon de la estro de la lernejo.

Sed Eloi informis al mi ke li havas planon foriri el la loko de Makamba por iri studi al universitato. Li havas la planon, sed ne scias kiam li ekforiros por la studado.

Pro tio, mi diris al li ke unue gravas restarigi la klubon ; due mi petis de li ke li trejnu esperantistojn, kiuj povos okupiĝi pri la klubo, kaj instrui dum lia malproksimeco.

Vizito al Rutana : Diskuto kun Nestor Haragakiza kaj la grupo :

En Rutana ekzistas klubo de Esperanto. Nestor Haragakiza okupiĝas pri la instruado de Esperanto en la klubo.

Je mia alveno al Rutana vespere, mi havis la okazon renkontiĝi, kaj diskuti kun Nestor Haragakiza. La sekvantan tagon mi renkontiĝis kun la grupo de esperantistoj de Rutana.

La esperantistoj de Rutana rakontis al mi ke la klubo havas barojn : ili ne havas sufiĉajn librojn, foje kretoj mankas. En Rutana, ili petas havi bibliotekon de libroj kaj broŝuroj de Esperanto. La instruado de Esperanto en la klubo de Rutana okazigās en prunedonita lernoĉambro de elementa lernejo de iu pentekosta eklezio, en kiu anas kelkaj el la klubanoj.

Dum mia kunparolado kun la grupo de esperantistoj de Rutana, ili diris al mi ke iam ili aŭdis ke en la movado de Esperanto ekzistas subvencioj de kluboj, honorario por instruistoj, sed neniam la klubo de Rutana ricevis la subvencion, la instruisto volontulas, li neniam ricevis la aŭditan honorarion. Ili konstatas ke instruistoj de Esperanto estas malestimataj.

Al tiuj duboj, mi diris al la esperantistoj de Rutana ke mi devos informiĝi, post mi povos detale respondi al ili.

La esperantistoj de Rutana, petas okazigon de kongreso de Esperanto en sia loko. Ili esperas ke tio povos esti bona motivo por varbi neesperantistojn lerni la lingvon. Nestor diris al mi ke kelkaj el la samloĝantoj al Rutana pensas ke Esperanto estas inventaĵo de Nestor, ne esperantaj ke Esperanto povas esti internacia lingvo.

La esperantistoj de Rutana proponis al mi la disponigon kaj havigadon de lernomaterialoj al lernantoj, kiel skribiloj, kajeroj, ktp por kuraĝigi kaj instigi la lernadon de Esperanto al lernantoj precipe dum ferioj.

Kelkaj el la klubanoj de Rutana partoprenis en kelkaj el la jam organizitaj naciaj kongresoj de Esperanto. Kiam ili estis invititaj partopreni en la kongresoj, ili pensis ke post la kongresoj ili ricevus honorarion.

Vizito al Gitega : Diskuto kun Anicet Ndayizigiye :

Al Gitega, mi renkontis Anicet Ndayizigiye, kiu loĝas en la loko.

Anicet laboras for de Gitega, sed certigis al mi ke ĉiam semajnefine li revenas, kaj troveblas en Gitega, kaj povos instrui esperanton al giteganoj sabatojn aŭ dimanĉojn.

Li do promesis al mi ke li pretas serĉi lernoĉambron ĉe iu lernejo, kaj peti permeson por la okazigo de klubo de Esperanto. Li informis al mi ke li eĉ estas en kontakto kun respondeculo de katolika eklezio en Gitega, li ankaŭ estas en kontakto kun respondeculoj de la junulcentro de Gitega. Li esperas havi lernoĉambron el siaj konatuloj. Li ankaŭ esperas havi multajn membrojn en la klubo de Esperanto. Li planas lanĉi anonckomunikon en la preĝejo por alvoki interesantojn.

Vizito al Ngozi : Diskuto kun Saidi Kwizera, Jean Claude Banzubaze, Souleiman Ndabarushimana kaj Abdoulnur Nishimwe :

Ngozi enhavas multajn esperantistojn. Sed la klubo de Ngozi ne nun funkcias. Esperanto estis instruita al ngozanoj ekde 2012 de Gilbert Niyukuri, kiu studis tiam en Ngozi.

Mi demandis al la renkontitaj esperantistoj, kial la klubo de Ngozi ne funkcias por instrui novajn geesperantistojn.

Ili informis al mi ke post la foriro de Gilbert Niyukuri, la fondinto de la klubo, ĝi ne plu bone funkciis. Ili diris ke la ĉefa kialo estas la manko de loko por la okazigo de la instruadoj de Esperanto. Ili ankaŭ diris ke ili ne havas materialojn, kiel librojn de Esperanto. Ili provis instrui novajn geesperantistojn, kelkaj el ili progresis en la movado de Esperanto, aliaj forlasis la movadon pro manko de kuraĝo. Saidi Kwizera donis al mi ekzemplon ke en 2018, li kun aliaj tri malnovaj esperantistoj devis pagi por la vojaĝo de novaj geesperantistoj por partopreni en la kongreso farita en Nyanza Lac. Li diris ke tion ili faris por kuraĝigi la novajn geesperantistojn, ili ne volis kotizigi al la novaj geesperantistoj monon por la transporto, tio povus malkuraĝigi ilin, li daŭre diris al mi.

La esperantistoj de Ngozi diris al mi ke en Ngozi la lingvo Esperanto ekzistas, estas multaj personoj kiuj almenaŭ povas respondi al la salutado en Esperanto.

Sed la problemo estas ke personoj ĉefe bezonas profitojn. Ne multaj povas okupiĝi pri la lernado de Esperanto se ili ne envidas palpeblan profiton. Personoj okupiĝas pri aferoj pro la vivkialoj. Do ili daŭre rakontis al mi ke la instruado de Esperanto mankas motivon, ili profitis por sugestoj al mi ke la motivo povos esti la subteno de futbala teamo de ludantoj havigante al la teamo, materialojn, kiel pilkon, uniformojn, ... Saidi Kwizera diris ke li estas futbala trejnisto, ke estus facila por li krei esperantan futbalan skipon, sed tio postulus motivigojn al la teamo.

Jean Claude Banzubaze, unu el la renkontitaj esperantistoj de Ngozi pensas ke estus bone se en Ngozi ili povas havi oficejon, kiel centron de Esperanto en Ngozi.

Vizito al Mbuye : Diskuto kun la grupo de esperantistoj de Mbuye :

En Mbuye, mi vizitis la grupon de skoltismaj esperantistoj. La grupo nomiĝas "Mbuye Skolta Esperanta Klubo". Kelkaj el la renkontitaj membroj de la klubo estas Nicodème Ntakirutimana, Léopold Nzisabira, Ladislav Akimana, Ladislav Akimana, Nadine kwizera, Richard Hererimana.

La klubo estis fondita de Nicodème Ntakirutimana, la membroj de la klubo ĉefe estas skoltismaj movadanoj.

La esperantistoj de Mbuye rakontis al mi ke ili aŭdis pri la ekzisto de subvencioj al kluboj de Esperanto, kaj petis ke ili ankaŭ ricevus la subvencion, ĉar ili diras ke tio povos helpi al la klubo por la financo de projektoj, kaj tio fortigos la klubon. Kelkaj el la membroj de la klubo de Mbuye diris al mi ke ili povis starigi klubojn de Esperanto en aliaj lokoj de la ĉirkaŭo, sed tion malhepis la manko de rimedoj por, interaliaj, la transporto al la indikitaj foraj lokoj. Ili petis subtenon pro tio.

Ili ankaŭ petis subtenon por instrui Esperanton al aliaj skoltismaj movadanoj de la provinco. Ili rakontis al mi ke kelkefoje en tiu movado, estas organizitaj kampadejoj de skoltoj venantaj de ĉiuj lokoj de la provinco. Ili do indikis al mi ke tio estas bona oportuno por disigi la sciigon de Esperanto ĉar dum la kampadejoj, ili ricevas okazojn instrui novaĵojn al aliaj skoltismaj movadanoj. Tiam ili povos instrui Esperanton al aliaj skoltismaj movadanoj, ĉar ili diris ke iam ili parolis Esperanton dum la kampadejo, kaj konstatis la intereson de aliaj movadanoj. Ili plue informis al mi ke la problemo estos ke, post la kampadejoj, tio postulos al ili rimedojn por pretigi instruistojn de Esperanto por daŭre instrui la lingvon al skoltismaj movadanoj en la diversaj lokoj de la provinco.

La esperantistoj de Mbuye parolis ankaŭ pri la problemo de komunikado, ili bezonas esti informitaj de la evoluo de Esperanto en la mondo. Ili sugestas la havigon al la klubo de komputilo por raporti pri la laboroj de la klubo.

Ili petas la partoprenigon de multaj klubanoj en esperantaj eventoj naciaj kaj internaciaj.

Vizito al Kabezi : Diskuto kun Jean Claude Ninziza :

Ankaŭ en Kabezi iam ekzistis klubo de Esperanto, sed nuntempe la klubo ne funkcias. Kelkaj el la iama klubanoj disiĝis, kelkaj plu povas paroli iomete Esperanton.

Jean Claude Ninziza, loĝanta en Kabezi akceptis helpi por le restarigo de la klubo. En Kabezi, mi ankaŭ povis renkonti aliajn malnovajn esperantistojn, kiel Jean Paul, Jacques, Adolphe, kiuj akceptis varbi novajn esperantistojn.

Jean Claude Ninziza akceptis kontakti lernejestron por peti lernoĉambron por la okazigo de la klubo.

Li petis de mi afiŝojn por publikigi anoncon pri la restarigo de la klubo de instruado de Esperanto en Kabezi.

Li ankaŭ petis lernomaterialojn kaj vortarojn. Li daŭre petis subtenon al la klubo por havigi al ĝi kelkajn bezonojn, kiel la aĉeto de kretoj, ktp.

Vizito al Musigati : Diskuto kun Zabulon Ntidendereza :

Zabulon Ntidendereza estas malnova esperantisto. Li rakontis al mi ke li eklernis Esperanton de Birindwa Mushosi antaŭ la jaro 2000 al la Liceo de la Seminario de Ciya en Bubanza. Mia vizito al Musigati estis la lasta sur la listo de la planitaj vizitoj. Mi volis koni de Zabulon kial li ne plu aperas en la movado de Esperanto.

Zabulon rakontis al mi ke li observadis nekomprenitajn dividojn en la Esperanto movado. Li rakontis ke kiam li eklernis Esperanton, li aŭdis pri Civito kiel supera organo, poste li estis informita de UEA, kaj tio iel konfuzigis lin. Li iam estis membro de UEA, kaj havis eĉ multajn kontaktojn kun diversaj gravuloj en la Esperantujo.

Li plue informis al mi ke li povis partopreni en diversaj naciaj kongresoj de Esperanto organizitaj de ANEB en Burundo, li iam respondecis pri la instruado de Esperanto en diversaj kluboj, kiel en la Liceo de Bubanza kun iu Fabien Butoyi.

Iom post iom Zabulon malkuraĝiĝis kaj ne plu aperis en la movado de Esperanto ĉar li ne rimarkis evidentajn realigaĵojn en la movado de Esperanto en Burundo. Li diris ke kiam li gvidis la klubon de Esperanto en la Liceo de Bubanza, la asocio de Esperanto en Burundo, ANEB havis projektojn subteni klubojn de Esperanto, sed li neniam vidis la subtenon, lernantoj en la klubo vane atendadis atestilojn post periodoj de instruado, tio malkuraĝigis la klubanojn iom post iom.

Mi kunparolis kun Zabulon pri la ebleco starigi klubon de Esperanto en Musigati, kaj li promesis al mi ke li estas preta li mem starigi la klubon. Li proponis al mi starigi la klubon al la Liceo Bukinga, kie li instrulaboras. Li petis havigi al li materialojn de instruado de Esperanto, kiel lernolibrojn, ĉar li ne plu posedas librojn de Esperanto. Li ankaŭ sugestas vizitojn al la klubo por motivigi la klubanojn, al kiuj, laŭ Zabulon, estos interesa rimarki ke Esperanto estas vivanta lingvo.

Zabulon ankaŭ promesis kaj esperigis al mi serĉi inter siaj konatuloj esperantiston, kiu povos helpi restarigi klubon de Esperanto en la Liceo de Bubanza.

Miaj sugestoj al la vizititaj esperantistoj :

Dum miaj konversacioj kun la vizititaj esperantistoj, mi havis la okazon diri al ili miajn sugestojn. Inter aliaj, mi rememorigis al la esperantistoj ke la instruado de Esperanto estas volontula laboro, instruistoj de Esperanto ne devas atendi salajron, ni estis instruintaj la lingvon senpage, ni havu la emon konigi al aliaj tion, kion ni gajnis.

Por la vivteno de la kluboj kaj la kuraĝigo al la fortigado de la instruado de Esperanto, mi sugestis al la lokaj vizititaj geesperantistoj la jenajn sintenojn :

- kotizoj de membroj de kluboj : ke ĉiu klubo havu instancojn, inter aliajn la kasisto, kiu kolektas kotizojn el la membroj, kie la klubanoj havas la eblecon kotizi.
- Starigado kaj realigado de memfinancaj projektoj : depende de la loko, geesperantistoj starigu laŭlokajn/lokdependajn projektojn por la ekonomio de la kluboj.

Konklude, la vizititaj esperantistoj ege aprezis la faritajn vizitojn.

Multaj petis ke la faritaj vizitoj ne estu la lastaj, ili bezonas ke la respondeculoj plue vizitu ilin por konstati la laborojn en la respektivaj kluboj.

Resume, la sekvaj estas la obstakloj al la evoluo de Esperanto en Burundo :

Financa obstaklo : Instruistoj de Esperanto bezonas rimedojn por, interaliaj, aĉeti kretojn, la luo de la kursoĉambro, la transportado al klasoĉambro, fotokopiado de broŝuroj kaj libroj
La instruistoj ankaŭ petas ioman financon kuraĝigon.

Propono de kuraĝigo de geesperantistoj :

- Partoprenigi geesperantistojn en internaciaj eventoj.
- Se ekzistus iu fonduso por iel helpi finance la sindonemajn instruistojn, tio kuraĝigus ilin.
- Instrui al geesperantistoj la starigadon de memfinancaj projektoj.
- Financi la memfinancajn laborojn de lokaj geesperantistoj : bredado, agrikulturo, etaj komercoj, ktp.
- Organizado de konkursoj en diversaj kluboj de Esperanto.
- Organizi kaj subteni futbalajn grupojn.

Miaj vizitoj al la kluboj kaj/aŭ al geesperantistoj ebligis :

- Estimata Mirejo Grosjean, kiu ege helpis per la financado de la vojaĝoj kaj ĉiuj bezonoj ;
- ANEB, per la prezidanto de la Asocio, kiu trafe interaktis kun mi ;
- La bona kunlaborado de renkontitaj geesperantistoj.

Dankon al ĉiuj, kun specialaj kaj respektemaj dankoj al nia kara Estimata Mirejo Grosjean.

Gilbert Ndiokubwayo

Respondeculo de la Instrusekcio de Esperanto

ANEB

21-an de septembro 2020

Mirejo aldonas : Gilbert Ndiokubwayo ĵus nun sukcese finis la Esperanto Instruistan Trejnadon.

Se iu volas subteni la Movadon en Burundo, oni povas ekribi kun li.

gigi.kadi@gmail.com

+257 79 57 42 11

BP 7072
Bujumbura
Burundi